

KROATA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA „DRUŠTVO HRVATSKIH ESPERANTISTA“
KAJ DE LA „KROATA AKADEMIA ESPERANTISTA SOCIETO“.

MONATA

GAZETO.



La „Kroata Esperantisto“
aperas la 20^{an} de ĉiu monato.

Abono:

1 jaro K 4[—]
1/2 » K 2[—]
Por membroj jara abono K 2[—]

Redakcio kaj Administracio:
Zagreb, (Kroatujo) Zrinjski trg 16.
Redaktorino: **Danica de Bedeković.**

Reklamo:

1 paĝo K 25 1/4 paĝo K 7
1/2 » » 13 1/6 » » 4
kun unufoja apero.
Por 7-12 anoncoj 25% rabato
Po linioj laŭ interkonsento.

NAŠIM ĈITATELJIMA.

Podulja pauza, otkako smo izdali posljedni broj našega organa, zabrinula je i preko mjere mnogobrojne naše prijatelje. Dokaz su tome česti dopisi i upiti, koji su stizali sa svih strana na uredništvo „Kr. Es.“ Samu tu činjenicu koja nas je nedvoumno uvjerila, kako interes za našu ideju postaje od dana u dan sve jači življi, sve intenzivniji, bilježili bismo s osobitom radošću, kad nas ne bi pritom kao neki kobni memento opominjala misao, da je nehaj i gdje kojega od naših prijatelja pripomogao, da je došlo do te kobne, žalosne činjenice. Moramo nažalost reći, da se tu i tamo nije ni polazilo dalje od običnoga interesa, što bi konkretnije i u prozi značilo, da se list primao, a nije plaćao. Društvena subvencija za list nije dostajala, pa otuđ nastade nužno stagnacija. Međutim mi po onoj, da odvažne sreća pomaže, ne klonismo duhom, već u nadi na bolja vremena, nastavili smo svoj rad. Plod toga rada ukazuje se u tome, da smo našli formulu, po kojoj će ubuduće svako zapinjanje s listom biti onemogućeno. Društvena se naime imovina u toliko poboljšala, da će društvo moći započeto godište svoga organa dovršiti, dok će daljnje izdavanje lista povjeriti esperantskoj nakladi, našem odličnom prijatelju i knjižaru gosp J Sokolu. Time je dosta naglašeno, da je budućnost lista materijalno osigurana, a to je, moramo priznati, i bio onaj nesretni vez,

AL NIA LEGANTARO.

La longa paŭzo, de kiam ni aperigis la lastan numeron de nia organo preskaŭ tromalĝojigis niajn multajn amikojn. Tion pruvas la multaj korespondaĵoj kaj demandoj, kiuj de ĉie alvenis al la redakcio de K. E. Ĉi tiun fakton mem, kiu sendube konvinkis nin, ke la intereso por nia ideo fariĝas ĉiutage pli kaj pli forta kaj vigla, pli intensa, ni notus per precipa ĝojo, se ne admonus nin kiel ia fatala memento la penso, ke la malzorgo eĉ de kelkaj niaj amikoj kunhelpis la alvenon de tiu bedaŭrinda, fatala fakto. Bedaŭrinde ni devas diri ke tie kaj tie ĉi oni simple restis ĉe la ordinara intereso, kio pli konkrete kaj proze dirite signifas, ke oni la gazeton abonis, sed ne pagis. La monapogo de la societo ne sufiĉis kaj de tie devis deveni la halto. Sed laŭ la diro: „kuraĝulon eĉ feliĉo helpas“, ni ne malesperis kaj esperante pli bonajn tempojn daŭrigis nian laboradon. La frukton de tiu laboro montras la fakto ke ni trovis formulon, laŭ kiu estonte ĉiu haltado estos malebligata. La societa kapitalo pligrandiĝis tiel, ke la societo povas finiĝi la tiueĵaran jarkolekton de sia organo, kaj por la plua eldonado de la gazeto ni komisis la „Esperanto eldonejon“ de nia eminenta amiko kaj librovendisto Sro J. Sokol. Per tio estas sufiĉe akcentita, ke la estonteco de la gazeto estas mone certigita, kaj tio ja estis, ni devas konfesi, la malfeliĉa ligilo, kiu retenis niajn vervajn

koji nam je poletna krila stezao. Uredništvo će ostati u istim rukama kao i dosada, pa će s moralne strane nastupiti tek ta preinaka, da ćemo odsada — nezabrinuti za opstanak lista — dvostrukim marom i pojačanom energijom njegovati zajedničko gojenje »Kr. Es.«

Nadamo se pouzdano, da će na taj način naše glasilo, koje vazda prima laskave priznanice za svoj rad i od najudaljenijih i najvažnijih esperantista, moći još bolje ispunjavati svoju zadaću.

Uz to se oba naša zagreb. esp. društva obogatila u posljednje doba za lijepi broj članova, koji će zajedno s novim polaznicima posjećivati netom otvorene nove društvene tečajeve. Sve nas ovo ovlaštuje, da se nadamo boljim danima, ali u isto doba da i upozorimo sve naše stare i nove prijatelje da i oni uporedo i živom agitacijom pomognu uskoriti one dane, koje mi svi želimo.

Toliko, mislimo, da je bilo nužno reći kao uvod u novu razvojnu fazu i za Esperanto u Hrvatskoj, možemo ustvrditi, bolje doba, doba renesance.

flugilojn. La redakcio restos en la samaj manoj kiel ĝisnune, morale do sangigos la afero nur tiel, ke de nun ni senzorge pri la ekzistado de la gazeto per duobla fervoreco kaj plifortigita energio flegados la komunan fleginfanon K. E.

Ni firme esperas, ke tiamaniere nia gazeto, kiu ĉiam ricevasdas flatemajn aprobojn de famaj esperantistoj eĉ el malproksimaj landoj, povos ankoraŭ pli bone plenumi sian taskon.

Krom tio niaj ambaŭ zagrebaj societoj pliriĉigis lastatempe per bela nombro da anoj, kiuj kune kun la novaj frekventantoj vizitos la ĵus malfermitajn societajn kursojn. Ĉio tio rajtigas nin esperi pli belajn tagojn kaj samtempe atentigi kaj ekpeti ĉiujn niajn malnovajn kaj novajn amikojn, ke ankaŭ ili siavice kaj per vigla agado helpu al ni alproksimigi la tagojn, kiujn ni ĉiuj deziras.

Ni opinias, ke tion ni devis diri kiel enkonduko en la novan evolucian fazon por Esperanto en Kroatujo, kaj ni povas diri, en pli bonan tempon — la tempon de renaskiĝo.

SA VI. SVJETSKOG ESPERANTISTIČKOGA. KONGRESA U WASHINGTONU.

Nedavno je stigao na naše uredništvo opsežan izvještaj VI. svjetskoga esp. kongresa, koji se, kako je već poznato, održavao polovicom augusta u Washingtonu. Šalje nam ga naš prijatelj M. Pleše, koji je kao reprezentant hrvat. esperantista govorio na tom kongresu u ime Hrvata. Pisan je taj izvještaj zanosom vatrena Esperantiste, a uz to iscrpljivo i zanimljivo, pa nam je žao, što nam prostor lista ne dopušta, da ga u cijelosti saopćimo. Zato ćemo se samo na najvažnije ograničiti i izvaditi bilo sadržajno, bilo doslovno tek pojedine ulomke, koji će biti kadri, da nam osvijetle one triumfalne dane za Esperanto.

Kongres je posjetilo preko četiri stotine esperantista sa svih strana svijeta, koji su zastupali 23 narodnosti. I države su neke (jedanaest na broju) bile zastupane po oficijelnim zastupnicima, koji su u ime vlasti pozdravili kongres i aktivno sudjelovali u kongresnom radu. Sam španjolski kralj Alfonzo XIII. bio je službeno zastupan po svom izaslaniku kapetanu Perogordo »Najljepše je bilo«, piše nam prijatelj Pleše, »kada je Kinez Lu Ping Tien, tajnik kineskoga poslanstva, u kineskom jeziku pozdravio kongres, i obećao, da će nastojati kod svoje vlade, da se Esperanto uvede u sve škole u »nebeskom carstvu«. Kada su to u prijevodu čuli Esperantisti, pljeskanju nije bilo ni kraja ni konca. Isto je tako u perzijskom jeziku pozdravio kongres delegat iz Perzije, Ali Kuli Khan«.

Razumije se, da je i sam autor Esperanta, dr. Zamenhof posjetio kongres, pa je tom prigodom izrekao vrlo važnu riječ, koju objelodanjemo na drugome mjestu. Iz izvještaja razabiremo, da je gosp. Pleše. kao odaslanik našega društva govorio odmah drugi po redu, pa je iza svoga govora, kojega ćemo odmah u cijelosti saopćiti, ubrao obilan pljesak i iskaze osobite simpatije. Rekao je ovo:

Kara Majstro, gesinjoroj!

Mia koro estas tre ĝoja. De kiam mi komencis lerni Esperanton, kaj ekamis ĝian ideon, mi tre deziris ĉeesti al unu kongreso esperantista. Nun mia varma deziro realiĝis. Mi troviĝas ĉirkaŭita de multaj esperantistoj, kiuj min amas kiel fraton, tiel ke ŝajnas al mi esti ankoraŭ en mia patra domo.

Mian ĝojon pligrandigas la fakto, ke mi povas je tiu ĉi kongreso reprezenti mian karan nacion kroatan, kaj diri al ĉiu esperantistaro: Ekzistas sur la bela bordo de la maro Adriatika bela lando, en kiu loĝas malgranda popolo, nacio Kroata, kiu numeras nur kelkajn milionojn da homoj. En tiu ĉi nacio la ideo de esperantismo enradikiĝis tre profunde. En nia ĉefurbo — la blanka Zagreb — ni havas »Kroatan esperantistan Asocion« kun 150 anoj. Tiu ĉi asocio eldonas la monatan gazeton »Kroata Esperantisto«, kiun certe multaj el esperantistoj ĉi tie ĉeestantaj jam legis. Ekzistas ankoraŭ »Akademia Esper. Asocio« de universitatoj. Tiuj ĉi du asocioj disvastigis la ideon esperantan en la tuta lando tiel, ke nun ankaŭ en aliaj urboj ekzistas kluboj kaj kurzoj esperantistaj.

Por la afero de Esperanto ĉe ni klopodas kaj klopodis pleje nia kara samideanino, estim. Sino Danica de Bedeković, kies nomo — kvankam ŝi havas multajn aliajn okupadojn — tamen estas la unua inter kroataj esperantistoj. Ŝi verkis gramatikon kaj vortaron esperantan, kaj estas ankaŭ redaktorino de nia monata gazeto. (Aplaŭdoj de la kongresanoj)

Mi devas ankoraŭ rememori aliajn ĉe ni meritajn esperantistojn, kiel: sinj. Bothe, prezidanton de nia D. K. E. sinj. Špicer, kiu ankaŭ verkis gramatikon esperantan; sinj. Stalzer, prezidanton de la »Ak. Esp. Asoc.«; sinj. Badalić la fervoran sekretarion de D. K. E., kiu reprezentis la kroatan katol. esperantistaron en Parizo ĉe la Katolika Esper. Kongreso.

Jen mi per malmultaj vortoj diris la ĉefaferojn de la esperanta movado en Kroatoj. Mi diros ankoraŭ tion ĉi: Kun aliaj pli grandaj nacioj kunigis la malgranda nacio Kroata batalante por la sankta afero de Esperanto. La multaj esperantistoj de tiu ĉi nacio sendis min saluti nian karan Majstron Dron. Zamenhof, kaj ĉiujn esperantistojn ĉeestantajn en la kongreso.

Tial mi el profundeco de mia koro salutas ĉiujn kriante: »Ni bataladu kune tenataj por unu bela espero«!

Vivu Esperanto!

Burno povladivanje nastalo je nakon svršena govora našega hrvatskoga delegata Mnogi prisutni pristupiše k njemu, da mu čestitaju, među njima i sam autor Esperanta dr. L. Zamenhof, koji se još točnije informirao kod njega o esperantskome pokretu u Hrvatskoj i poslao posebno pozdravno pismo urednici našega lista: gđi Danici pl. Bedeković.

Pričajući nadalje svoje dojmove, zaključuje svoj izvještaj s velevažnim rezolucijama, koje je stvorio kongres. Točnije bi o tom izvijestili, ako bi doslovce naveli njegove riječi. Zanimiv je više nego važan slučaj, koji nam dalje priča gosp. Pleše, kako su ga Amerikanci prinukali, da im priča o svojoj domovini. Jednako nam dalje opširno izvješćuje gosp. Pleše o različitim prijedlozima, koji su bili izneseni na kongresu. Za nas će možda biti najvažnije samo to, ako spomenemo, da će buduće godine biti kongres u Antverpenu, god. 1912 u Krakovu i god. 1913. u Rusiji. Dijeljenje različitih nagrada za najbolje radnje u Esperantu, zajedničke izlete, pa zakusku kod predsjednika udruženja američkih republika gosp. John Baretta — opisuje nam opširnije gosp. izvjestitelj, ali mi ćemo to mimoići i završiti sa zahvalom g. Plešeu, koji nije žalio ni truda ni troška, što ga zadaje tako naporan put, nego je svojom živom besjedom pronio ime hrvatsko i preko dalekoga oceana, među mnogim i mnogim inteligentima, koji doslije ne poznavahu ni imena našega. Zbilja, u ovaj čas najbolje osjećamo iskrene riječi g. Pleše, koje nam na koncu svoga izvještaja dovikuje: »Hrvat će svoje ime po Esperantu najviše prodičiti — zato neka ga uči!«

Jos. Badalić

GOVOR DRA. ZAMENHOFA, KOJIM JE OTVORIO VI. SVJETSKI ESP KONGRES U WASHINGTONU.

Zemljo slobode, zemljo budućnosti, pozdravljam te; zemljo, o kojoj sniju mnogi patnici i nevino progonjeni. pozdravljam te; kraljevstvo čovječanstva koje ne pripada samo ovome ili onome plemenu ili crkvi već svim svojim čestitim sinovima. poklanjam se tebi i sretan sam, što mi je sudbina dopustila, da te vidim i da udišem bar neko vrijeme tvoj slobodni po nikomu monopolizirani uzduh.

Zdravo, Sjedinjena državo, najmoćnija predstavnice novoga svijeta. Mi sinovi staroga kontinenta dođosmo k tebi kao gostovi, no nismo se zaputili k tebi od puste radoznalosti, niti nas je koja trgovačka probit vodila do tvojih obala. Došli smo k vama, sinovi ove zemlje, da vam donesemo novi osjećaj, novu misao; došli smo, da donosimo nove hrabrosti onim našim sumišljenicima i pobornicima zajedničkih nam ideala, koji su dosele radili među vama i čije ste vi riječi o nekom novome puku smatrali možda pričom.

Jedan dio ovoga po svome podrijetlu različitoga no ipak jezikom i srcem istoga puka stoji evo realno i živeći pred vama. Pogledajte nas, poslušajte nas, i uvjerite se, da nismo priča. Mi smo članovi različitih plemena, pa ipak se osjećamo, kao da smo od istoga plemena, jer se razumijemo međusobno kao takovi, ne imajući potrebe ponizivati se međusobno ili mucati jedan drugome u stranome jeziku. Nadamo se, da će našim radom prije ili kasnije čitav svijet naličiti nama i postati tako jedno veliko ljudsko pleme, koje će sastojati od različitih obitelji, od kojih svaka imade svoj jezik i svoje običaje, nu za međusobni saobraćaj jezik im je i običaji zajednički. Na taj rad, kojemu je cilj, da malo po malo stvori sjedinjeno, dakle ojačano i duševno podignuto čovječanstvo, pozivljemo vas, sinove Sjedinjenih država. I nadamo se, da nam poziv ne će ostati uzaludan, već da će se poput jeke odazivati sa sviju strana vaše zemlje i po čitavom vašem kontinentu

Malo nas je samo moglo doći u vašu zemlju jer mi esperantisti nismo ljudi bogati, ne možemo dakle od ovoga kongresa očekivati zaključaka, važnih po čitav esperantski svijet. Došli smo k vama, stanovnici Sjedinjenih država, ponajviše, da sprovedemo u vašoj sredini i pred vašim očima tjedan našega esperantističkoga života, da vam pokažemo bar malen dio toga života, da vam donesemo sjeme; i nadamo se, da će poslije našega odlaska ovo sjeme moćno proklijati i porasti, i da će naša ideja imati u vašoj zemlji naskoro svoje najslavnije i najznamenitije apostole.

U vašoj je zemlji, sumišljenici Sjedinjenih država, naša stvar još veoma mlada i mnogi od vas nisu si još stvorili posve jasnoga suda o njoj, zato dozvolite, da bar ponešto istražim pred vama put, kojim mi stupamo.

Za čim ide esperantistički pokret? On smjera da postigne međusobno razumijevanje između svijuu ljudi i pukova. Čemu nam je potrebno ovakovo međusobno razumijevanje? Kakove će mu biti posljedice? Što očekujemo od njega? Zašto želimo, da ono svakako bude na neutralnom temelju? Zašto tako ustrajno radimo za nj? Kakav je to duh, koji nas sve veže međusobno?

O svemu tomu već sam mnogo govorio, pak ne želim ponavljati svojih riječi; tim manje, što će svaki od vas, razmisliši stvar, sam pogoditi odgovore. Pred vama, praktični Amerikanci, želim da raščinim drugo pitanje i to: stojimo li mi sa našim radom na putu posve sigurnome, ili moramo li se bojati, da će se jednoč čitavi naš rad pokazati uzaludnim? Jedino potpuna svijesnost o putu, kojim želimo da stupamo, dat će putnicima dovoljno energije, da se bore protiv svijuu teškoća na tome putu.

Cilj, za koji radimo, dade se postići na dva načina: ili radom ljudi privatnih, t. j. pučkih masa, ili dekretima zemaljskih vlada. Vjerojatnije će se stvar postići putem prvim, jer k stvari, kao što je naša, dolaze vlasti sa svojom sankcijom

obično tek onda, kad je stvar već posve priređena. Kakav treba da bude karakter prvoga puta, o tome nitko i ne sumnja; svaki će shvatiti posve dobro, da stvar, čija se bitnost i život temelji na međusobnome sporazumljenju, može rad masama voditi k cilju samo onda, ako svi rade jednodušno. U takovoj je stvari, pokazuje li se ona sama po sebi sposobnom da živi, sloga najsigurnije jamstvo sigurnome uspjehu, a nesloga znači smrt. To dobro razumiju naši sumišljenici i zato oni s indignacijom odbijaju svakoga, koji bi ih mogao odmamiti sa zajedničkoga puta. No kojiput pojavi se u glavi ovoga ili onoga sumišljenika slijedeće pitanje: Što će biti, lati li se kada riješenja problema međunarodnog jezika koja veća sila, protiv koje smo mi svi preslabi, na pr. zemaljske vlade? Treba li, da se bojimo, da će one doći možda do drugoga riješenja, no što ga mi izabramo, pak će na taj način postati sav naš rad uzaludan?

Da uzmognemo naći pravi odgovor ovome pitanju pomislimo si, da zemaljske vlade ili koja druga uplivna sila postave autoritativni odbor, koji ima da odluči, koji će jezik biti međunarodni. U članku »Esenco kaj estonteco« (Bitnost i budućnost), kojega su mnogi od vas čitali u »Fundamenta krestomatia« raspravio sam potanko ovo pitanje i pokazao posve jasno ono, o čemu u današnje vrijeme već nijedan iztraživaoc ne sumnja, da naime taj odbor, o kojem sam govorio, ne može nikako izabrati koji od narodnih ili koji od mrtvih jezika, ali ni jezika s posve izmišljenim rječnikom već on nužno mora da izabere jedino Esperanto i to ili u svojoj sadašnjoj ili donekle promijenjenoj formi. Kad bi odbor u opreci sa svim zahtjevima razbora htio da stvori koju drugu odluku, njegova bi odluka ostala samo odlukom na papiru koja bi bila u praksi apsolutno bez ikakove vrijednosti. Razmotrimo sada, koji bi bio jedini način, na koji bi mogao odbor riješiti zadnju alternativu.

Najprirodnije i najvjerojatnije je, da odbornici odluče naprosto ovako: »Već ima umjetni jezik, koji se pokazao potpuno sposobnim da živi, koji izvršno funkcioniра i živi već mnogo godina, koji si je stvorio znamenitu već literaturu, stvorio si je duševni život itd., dakle umjesto da pravimo bez svake potrebe i cilja nove riskantne experimente, poprimimo naprosto onaj, koji već postoji, poduprimo ga autoritetom onih država, koje zastupamo i bit će odmah potpuno riješen čitavi taj rječni problem, a već od sutrašnjega će se dana razumjeti međusobno čitavo prosvjetljeno čovječanstvo«.

Ovo je, ponavljam, najprirodnija odluka, koju možemo očekivati od odbora, izabranoga po pojedinim državama. No predpostavimo, da odbor zaključi, da su u Esperantu nužne različite preinake. Kako će pri tom postupati?

Prije svega toga pita se: da li je on dosta jak, da nametne svoju volju svojom teorijom tolikim milijunima ljudi, koji su do sada sami radili u toj stvari? Esperantisti radili su dugi niz godina, mnogo su radili, mnogo žrtvovali i s velikom teškoćom postigli to, što se mnogo tisućljeća pričinjalo nedostižnim i što se jednom izgubljeno nebi dalo nikada više postići, jer bi svijet izgubio čitavo povjerenje u ideju međunarodnoga jezika. Svaki bi si dakle razboriti, čestiti odbor rekao: treba da budemo veoma oprezni, da stvar umjesto da je pospješimo, ne upropastimo za uvijek. Kad bi odbor znao, da ga je izabrala na pr. samo koja vrlo malena, neznačajna državica, da je izbor samo puka formalnost bez vrijednosti, da se onaj, koji ga je izabrao nimalo ne zanima za stvar i nema ni najmanje namjere a ni, moći podupirati ga, tada bi razboriti članovi odbora izrekli samo naprosto svoje mišljenje i želje o različnim eventualnim preinakama u Esperantu i prepustili samim esperantistima, da odluče, prihvaćaju li ih ili ne, no nikad ne bi započeli takmenja protiv esperantista, jer bi uvidjeli, da bi to moralno bio samo zločin protiv ideje međunarodnoga jezika i da bi to u praksi prije ili kasnije vodilo do fiaska

(Nastavak slijedi).

INTERNACI 7-a KONGRESO DE ESPERANTO.

Unua cirkulero.

Antverpeno, 20—27 Aŭgusto 1911.

La organiza komitato de la kongreso, kiu alprenis la nomon »La Sepo por la Sepa«, estas kunmetita jene:

Sinjoroj: Van Der Biest-Andelnof, prezidanto de la Belga Ligo Esperantista prezidanto; Oscar van Schoor, farmaciisto, vicprezidanto; D-ro W. Van der Biest, okulisto, sekretario-kasisto (Adreso: 70, Minderbroedersrui, Antwerpen—Canal des Recollots, Anvers); F-ino Marie Posenaeer; Sinjoroj: Leutenanto Fr. Dupont; Louis Ritschie, ĉefoficisto de la Publika Instruado; Fr. Schoofs, komerca oficisto.

La Sepo jam tre ageme laboradas. Ĝi akiris la certigon de la morala kaj financa apogo de la Urbestro kaj de la kunhelpo de Anvers-Reclame. Interkonsente kun tiu organismo, ĝi presigis kaj disdonas 10.000 tre elegantajn, bele ilustritajn 32-paĝajn broŝurojn pri Antverpeno kaj la kongreso, el kiuj 2.000 estas senditaj al Washington. La aliaj estos disdonataj kaj dissendataj plej efike.

Ankaŭ estas eldonitaj 100 000 ekzempleroj de artplene gravuritaj reklammarkoj, vendataj en kovertoj da 100 ekzempleroj, po 1 franko. Jen bonega reklamilo, kiujn ĉiuj samideanoj dezirus aĉeti.

Inter la organizotaj festoj estos citinda la prezentado de la famkonata teatraĵo Kaatje, originale franclingve verkita de Paul Spaak, esperantigita de D-ro W. Van der Biest, kaj ludota de artistoj de la Reĝa Flandra Teatro. La komedio estas en presado kaj baldaŭ aperos.

Ĉar de nun La Sepo havas gravajn elspezojn pro la unua organizado, korespondadoj kaj presaĵoj, ĝi estos tre dankema al tiuj samideanoj, kiuj de nun mendas kaj pagos sian kongresan karton (Fr. 12.50 = Sm. 5.) Sin turni al la sekretario-kasisto.

La Sepo esperas, ke La Sepa estos multenombre ĉeestata, kaj nenion preterlasos, por ke la kongreso estu inda je la ses antaŭaj kaj je la konata gaste-meco de la artama Antverpeno.

Literatura kaj amuziga parto de »Kroata Esperantisto«.

LA UNIVERSALA FRATECO

Poezio, kiu ricevis la 1an premion
en la literatura konkurso de l' Sesa
Internacia Kongreso de Esperanto,
Washington

Sur ondegaj malpacemaj
De profunda, nigra mar'
En ŝipet' iras sentime
Plej kuraĝa maristar'.
Estas tero malproksima,
Ocean' montriĝas nur;
Sur akvaro la senlima
Ne briletas la lumtur'.

Kaj la nokt' estas malhela,
Sed ŝipet' antaŭen iras
Sub ĉiel', arkaĵ' senstela...

»Kien iras vi, ŝipistoj,
Sur dezerta l'ocean'?'
Ĉu la morton vi ne timas
Pro koler' de l'uragan'?'
Kien iras vi, bravuloj,
Kion, fratoj, celas vi?'
Nur riferoj, ne insuloj
Ja troviĝas tie ĉi.«

Kaj de l' vento forpuŝata
La ŝipet' antaŭen iras
Sur akvaro la malglata.

Niajn hejmojn forlasinte
Ni foriris el patruj'
Al haveno ni vojaĝas;
Ĝi aperos, certe, tuj . . .
Ke ĉiel' bela fariĝos,
Kaj ne estos plu danger',
Ke la maro trankviligos
Nin certigas la esper'.

Ventoj ĉesas. En ĉielo,
Inter nuboj, tremtante,
Ekbriletas luma stelo . . .

Al ŝipistoj nun similaj
Ni laboras kun fervor',
Ĉiujn barojn ni faligos
Nur kun amo en la kor'
La espero nin protektas,
Dum vojaĝo regas ĝoj'
Verda Stelo nin direktas
Tra la tuta longa voj'!

Al laboro, kolegaro!
Ni daŭrigu, kuncelante
La Fratecon de l' Homaro.

J. B. Mello Souza.

HO BIRDETOJ . . . !

Ho, birdetoj belkantantaj!
Vokas vin la ruĝaŭroro:
Vi ekflugu sur la branĉojn
Kaj ekkantu vi el koro!

Kantu vi la gajan kanton.
Por saluti tagon helan
Kaj por veki mian Milko'n,
Kiu songas songon belan . . .

Kiam hela tag' aperos,
Venos ni en boskon vian:
Vi prikantu nian amon —
Paradizon kantu nian!

CI ESTAS TUTA BLANKA . .

Ci estas tuta blanka, delikata,
Facila flugileto de l' anĝelo,
Kaj ĉe la ĉarmo tiu esotera
Okuloj estas — sunoj de l' ĉielo!

Ni ne admiras, ke de l' tiu ardo
La mia kor' ĝis polvon elbruliĝas,
Sed kiel, Anjo, ci gracia, tuta
Ĉe tiuj sunoj cindro ne fariĝas . . . ?!

Nikolao Bubalo-Slaviĉ (Sarajevo).

AMO-SOPIRO.

Versaĵo en prozo.

Ĝi estis antaŭnelonge.

Nur unu fojon havis tempon sin vesti per nova mozaiko, flora kaj verda, la naturo

Kiel nun floris konvaloj kaj violoj, kiel nun la ridanta suno disverŝadis varmon kaj vivon sur la molan verdaĵon!

Ĉio estis tiel bela, tiel pura. Oni sentis junecon kaj friŝecon, viglan forton en si mem kaj en ĉio ĉirkaŭanta.

La luksa ornamo de l' arbaro, la krispa loganta verdeceto tiel tiris al si, la printempa aero spiris aromon de nekonataj floroj, pli fortan ol tiu de konvalo kaj violo! . . .

Mi aŭskultas silenta tion, kion murmurettadas l' arbaro, kion kantas la birdoj kaj subita malĝojo ekkaptas min, ne, ĝi estas ne malĝojo, sed sopiro Ia stranga disigo naskiĝas interne inter ĉi tiuj sunoj kaj mia animo

Oni antaŭsentas, ke baldaŭ venos la lasta tago de ĉi beleco, de ĉi muziko, en kiu partoprenas la okazadoj de mia propra koro.

Ĉar mi antaŭsentas la lastan horon de mia amo.

La koro nerveme ekstrema kaj tuj kvazaŭmortas, kiam mi pensas, ke baldaŭ, tre baldaŭ ĉio devas rompiĝi, disfali, en la abismon de eterneco malaperi

Kaj la horo venis.

La suno jam kliniĝis al okcidento. Purpure flamas la malleviĝo kaj nepalpebla vualo de krepusko sin sternas al tera supraĵo.

Ju pli mi proksimiĝas al la albordigejo, des pli kreskas mia sopiro, sopiro pri l' amo mortonta. Tra mia rememoro pasas vico da bildoj helaj, impresoplenaj... ĉu do ĉio ĉi estas nur trompo, ĉu ĉio baldaŭ estos forgesita? . . .

Sed jen ĉe fluoturno la riveron superflugas kelkaj ekmuĝoj. La vaporŝipo. — Sur la albordigejo regas irado kaj interpuŝado. Ĉiuj ien rapidas.

Apogita sur la balustradon, ŝi staras senmova, rigardante en la malproksimon. Ŝi estas trankvila kaj belega, kiel antaŭe.

Ni bone rekonas la detalajn trajtojn de ŝia figuro.

Mi suriras la ferdekon.

Kun silenta rideto ŝi la unua etendas al mi sian etan manon.

Kelkaj sensignifaj vortoj . . . nenio pri la disiĝo Ni ŝajnas samaj kiel ĉiuj aliaj vojaĝantoj. La signalo pri foriro de vaporŝipo estas donita. Mi volas diri al ŝi ankoraŭ kelkajn vortojn . . . sed ni adiaŭiĝas.

Ree sama manpremo muta, senvorta, malrapida kaj trankvila. Mi nur vidas, kiel spiras ŝia brusto kaj en la malbrila rigardo mi legas la adiaŭan saluton . . .

Ni disiĝas kvazaŭ ĝis morgaŭe — — — — —

La ŝipo jam malaperis Mi staras ankoraŭ sur la malplena riverbordo.

Morgaŭ ĉio estos alia.

Nek la smeraldoj de l'arbaro nek birdohoroj plu min ĉarmos. Ĉio ŝajnos dezerto. Mi ne plu vidos florojn, nek sentos ilian vivigan odoron.

Sopiro Amo. Sopiro — — — — —

Ĝi estis antaŭnelonge. Pasis nur unu jaro.

Nova tapiŝo da floroj kuŝas nun antaŭ miaj piedoj.

Samaj estas la konvaloj kaj violoj, la sama juna vivo forte fluas ĉirkaŭ mi

Kiel inkuban songon, kiel deliron mi rememoras la pasintan jaron, ŝajne nenio restis kaj mia nova amo aperas kiel io nekomparebla kun tio, kion mi travivis.

Ĉio pasinta estas forgesita. Mi spiras per nova amo, per nova vivo, por karesoj kaj revoj sed aŭskultante la silentan bruetaĉon de branĉoj, la plaŭdetadon de akvoj, mi eksentas nedireblan sopiron.

Kial? — Ĉu mi sopiras pri amo pasanta, ĉu pri tio, kio enhavas la eternan enigmon de naturo?

Mi ne pensas pri ĝi

Mi nur malĝojas kruele, antaŭsentante, ke ankaŭ mia nova amo, bela kaj forta baldaŭ estos drononta en la eternon, kiel stelo falanta.

Nenia hela postsigno! La animo sentas la malplenton.

Sopiro.

Amo. Sopiro

* * *

Originale verkita por »Kroata Esperantisto« de E r o.

FIN DE SIÈCLE.

El *Rikard Katalinić-Jeretov*,

Ĉiuj kuris post li.

Maljunulinoj, viroj, infanoj, policanoj — ĉiuj. Oni preskaŭ minacis lin per pendigilo, oni kriadis: kaptu la friponon! Kion li estis farinta? Li ŝtelis de maljuna vendistino peceton da pano. Li estis malgranda, maldika, lacigita infano. Oni kaptis lin.

— Kiom ĉi faris, fil' de hundino — — ŝtelistaĉo?

— Mi estis malsata — rediris la malgrandulo. Larmoj brilis en liaj okuloj. Sopire li rigardis la peceton da pano en la tremanta mano. La policano forprenis de li la panon kaj kondukis lin fiere al la policejo. Post ili kvazaŭ formikamase iris la homoj — — — — —

Sur la alia flanko de la strato preteriris sinjoro, fiera sinjoro.

— Lin oni konduku malliberejon — ekaŭdiĝis la voĉo de iu longa, alta maldikulo, certe »fantasto«.

— Kial? — demandis alia

— Li bankrotis kun cent mil kronoj — trompis multajn malriĉulojn, farinte el ili almozulojn.

— Mi petas vin, sed li honesta - maniere farigis ĉion propraĵo de sia edzino.

Trad. Ivan Stalzer.

GRANDA ENVIO.

Oni diras, ke la envio estas patrino de l' malico kaj ĝi estas kalkulata kiel unu el la sep ĉefaj pekoj.

De envio ĝis malico estas malgranda paŝeto. Oni rakontas la sekvantan historion:

Reĝo havis du honestajn kaj fidelajn adjutantojn, sen kiuj li ne povis esti, sed ili reciproke sin malamamis. Iun tagon por provi ilian malamon, la reĝo vokis unun el ili.

— Auskultu, — diris la reĝo al la adjutanto, — mi estas tre kontenta de via senekzempla servo kaj tial mi decidis fari al vi multekostan donacon, do elektu: domon aŭ monon, kaj post unu horo venu por komuniki al mi kia estus la domo aŭ la sumo, kiun vi postulos. Mi donos ĝin al Vi, sed sciu, ke al la alia adjutanto mi donos ĝin duoble.

La adjutanto eliris longe li pensis kion postuli de l' reĝo. »Se mi demandos kortegon, la alia ricevos du, se mi demandos 100,000 frankojn, li ricevos 200.000 ktp.

Fine li aperis antaŭ la reĝo:

— No, diru, kion vi deziras.

— Mi deziras, ke vi eltirigu al mi okulon.

— Kiel, mi eltirigu al vi okulon?!

— Por eltirigi al la alia la du okulojn, aldonis malice la adjutanto.

Longe pensis la reĝo pri tiu terura kaj granda malico . . .

Esperantigis: Iv. K. Krestanof.

Virinoj kaj horloĝo.

Juna knabino similas al nova horloĝo, ĉar ĝi estas ĉiam rapideca, vigla.

Bela knabino estas kvazaŭ horloĝo sur la turo, kiun ĉiu rigardas, sed neniu prenas.

Babilema knabino estas kvazaŭ horloĝo luĝanta muzikpecojn, komence ĝin ĉiu volonte aŭskultas, kaj poste ĝi iĝas enuiga

Riĉa knabino estas kvazaŭ ora horloĝo: ĉiu demandas pri ĝia prezo.

Virino, kiu estas bona mastrino, similas al granda pendhorloĝo: ŝi iras malrapide, sed indece.

Trad. Ljubo Miĉević.

DEK MORALAJ ORDONOJ DE KOMENSKY : 1. Ne rakontu ĉion, kion vi scias; ne kredu ĉion, kion vi aŭdas; ne postulu ĉion, kion vi vidas; ne faru ĉion, kion vi povas, sed sole ĉion, kion vi devas kaj vi estos singardema. II. Estu modesta, ne aroganta, silentema, ne parolema! Kiam iu parolas, silentu: kiam iu diras ion al vi, aŭskultu; kiam li ordonas ion al vi, vi estu ĉiam kompleza. III. Estu afabla kontraŭ ĉiu, estu flatema kontraŭ neniu; evitu flati! IV. Estu plue super

ĉio justa! Postulu nenion fremdan, nenion proprigu al vi! V. Vi devas esti ankaŭ brava; vigla por labori; lasu la liberan tempon al la mallaboremuloj. VI. La Fortuno estas kapricema, ĝi alportas diversajn okazojn, multefoje malĝojajn. Tiujn ĉi la homo pacience toleras, timemulo sopiras, ploras kaj ĝemas VII Estu ankaŭ bonvola kaj kompatema! Se iu petas vin pri io, donu al li, se vi havas; al la malfeliĉulo helpu, se vi povas! VIII. Se iu ofendis vin, pardonu al li la kulpon. Se vi faris malbonon al iu kontentigu lin kaj senkolerigu lin! Estas belege subpremadi la koleron, pardonadi al la kulpiginto kaj al la petinto pri la pardono. IX. Enviu al neniu, deziru al ĉiu, faru agrablaĵon, al kiu vi povas kaj vi plaĉos al ĉiuj bonaj homoj. X. Parolu ĉiam la veron, ne volu mensogi! (El »Bohema esperantisto« Praha III., Kampa 495, Bohemujo-Aŭstrio; jara abonpago Sm 1.70)

Trad. H. K. Bouška

DEK KONSILOJ AL ESPERANTAJ TRADUKANTOJ. (El »Revuo internacia« 1, 3, 87) 1. Ne traduku por preso, se vi ne ellernis ankoraŭ esperanton 2. Traduku sole el via propra lingvo. 3. Ne traduku tradukaĵojn. 4. Ne traduku malnovaĵojn. 5. Ne traduku trivialaĵojn virtajn kaj malvirtajn. 6. Ne traduku ne konatigante kun la nova literaturo de via propra lingvo, kun ĝiaj tendencoj kaj formoj. 7. Memoru, ke perloj de literaturo malofte troviĝas en familiaj ilustritaj revuoj. 8. Memoru, ke krom etimologio ekzistas ankoraŭ sintakso. 9. Plej ofte distranĉu frazojn per punktoj, plej ofte disŝiru kunmetitajn vortojn. 10. Ne traduku versojn ne ellerninte regulojn de versofarado entute kaj de l'esperanta aparte.

Pasanto.

HUMORAĴO.

Ankaŭ parolado.

Unu delegito venis dum la libertempo hejmen, kaj liaj elektintoj demandis lin: »Kial oni neniam legas en la gazetoj, ke ankaŭ vi iam paroladis?« »Ho, homoj«, li respondis, »estu saĝaj, vi ne komprenas tion. Ĉu vi ne legas ofte en raportoĵ pri la »ĝenerala murmurado?« Jen, tiam ankaŭ mi paroladas.

A m b a ŭ f l a n k a a m u z a d o.

Iu afabla adzo amuziĝis dum la vintro tiel, ke li bindis sian edzinon je arbo, kaj ĵetis el iu distanco negopilkojn kontraŭ ŝi. Kiam oni demandis lin, kial li tiel agas kun sia edzino, respondis li: Tio ĉi okazas por nia ambaŭflanka amuzo. Ĉar se mi trafas ŝin, ĝojiĝas mi, kaj se mi ne trafas ŝin, ĝojiĝas ŝi.

Esperantigis Antonija Jožičič.

DRUŜTVENE VIJESTI.

